la aŭtoro mi uzas nur kunmetaĵojn: batvipo = vipo por bati, korektprogramo = programo por korekti, ktp.

5) Surbaze de mia ĉi supra vidpunkto mi do ne trovus necesa klasigi la menciitajn cel-adjektivojn en specialan grupon, sed parolus pri kunsufiksa adjektivo (porpuriga teĥnologio) aŭ prefere pri vortkunmetaĵoj (sidmebloj).

6) Mi ne kredas, ke "la aga adjektivo plej ofte staras post la substantivo": kp. manĝanta ĉevalo, konata fablo, perdita mono, vizitonta Esperantisto ktp.

Ofte oni povas plimallongigi vorton en Esperanto, se la signifo koniĝas. Sed en sciencaj verkoj kaj en internacia komunikado mi preferas esti tiom klara kiom eblas, kaj do uzas iom pli da inko. Ekzemple la *Werner*-a sida meblo ĉe mi estus sidmeblo (= meblo por sidi), kaj sidpozicio (= pozicio de sidado), dum sida konsilo = konsilo pri la ago "sidi" kaj lia desegna papero = papero kiun oni hazarde uzas por desegni, dum desegnopapero (= lia signifo: celo) = papero speciale fabrikita por desegni.

Ni ne forgesu, ke unu el la signifoelementoj de vortkunmetaĵo estas la signifero "speciala", kio respondas al la "celo" de la aŭtoro. Do mi ne uzus por tio liajn senprepoziciajn kaj sensufiksajn adjektivojn el verboj.

*Marcelo* L*EEREVELD*
*12, Heather Grove*
*AU - Belgrave South, Victoria – 3160* / AUSTRALIO

**Pli gratulinde...**

En Scienca Revuo 53 (3) n-ro 190 p.115 oni legas pri "Du 80-jaruloj inter niaj aŭtoroj". Jes, laŭdado estas tio. Sed eĉ pli gratulinde estus, se oni eldonus artikolon: "Du 25-jaruloj inter niaj aŭtoroj". Tion oni urĝe bezonus. <rlewin@ucsd.edu>

*Prof. Ralph A.* L*EWIN*
*3110 Hubbs Hall, Scribbs Institute of Ocedanography,*
*University of California, 9500 Gilman Drive,*
*US - La Jolla, CA 92093-0202* / USONO
Tel: (858)534-4836, Fakso: (858)534-7313

Redaktista noto
Same gratulinde ja estus jam raporto, ke du 25-jaruloj aliĝus kiel membroj kaj fidelaj legantoj de Scienca Revuo! La redakta stabo de ISAE provas zorgi por regula eldono de scienca periodaĵo – estas la unuopaj ISAE-membroj mem, surloke veki la intereson pri nia Asocio kaj aktive subteni la estraron kaj la landajn delegitojn, trovi pli junajn membrojn kaj pli junajn aŭtorojn!



## Originalaj artikoloj en la lastaj 10 kajeroj de Scienca Revuo (2000-2002)

**n-ro 181 Vol. 52 (2000) (2) SR 2/2000 52 paĝoj**

| | |
|---|---|
| *I.F. Bociort* | Pri la estetika kriteriologio de la beletro, Parto I |
| *J. Kavka* | Titanito kaj apatito |
| *B. de Wit* | Biodiverseco: esenco de la vivo |
| *H. Wellhöfer & R.Sachs* | Bubalomaskoj de la Bvao (*Bwa*) en Burkino |
| *K.-H. Simon & I.Ullrich* | Spertoj sur la vojo al terminologia prilaborado de la forstfaka lingvo |

**n-ro 182 Vol: 51 (2000) (3) SR 3/2000 52 paĝoj**

| | |
|---|---|
| *I.F. Bociort* | *Mihai Eminescu*, la meditema poeto |
| *R. Sachs* | Centjariĝo de Hamburga Tropika Instituto |
| *G. Kalkhof* | La sanktulo Bonifaco |
| *H. Nagata* | Psikolingvistika taksado de vortofarado de mal-vortoj en Esperanto: Apliko al franclingvanoj |
| *J. Kavka* | Baza premiso por la scienca leksiko de Esperanto |

**n-ro 183 Vol. 51 (2000) (4) SR 4/2000 52 paĝoj**

| | |
|---|---|
| *S. Stampa* k.a. | Paŝtejoj en sekaj regionoj |
| *N. Cumberlidge & R. Sachs* | *The crab that lives in trees* |
| *N. Cumberlidge & R. Sachs* | La krabo, kiu vivas en arboj |
| *J.E. Laferrière* | Maloftaj plantoj en Arizono, Usono |

**n-ro 184 Vol. 52 (2001) (1) SR 1/2001 52 paĝoj**

| | |
|---|---|
| *J. Kavka* | Esperantigo de germanaj nomoj, precipe por la bezono naturhistoria |
| *I.F. Bociort* | Pri la estetika kriteriologio de la beletro, Parto II – Praktiko |
| *W. Gunther* | Malsanoj de migrado |
| *H. Nagata* | Difinado kaj uzado de vortoj el kvar vortospecoj |

**n-ro 185 Vol. 52 (2001) (2) SR 2/2001 52 paĝoj**

| | |
|---|---|
| *W. Gunther* | La Internacia Lingvo kiel preventilo de la noosfero |
| *R. Sachs* | Biocenozo kaj zoonozoj |
| *H. Hoffmann* | Komenco de nociosistemigo ĉe fervojo |
| *O. Haszpra* k.a. | Prikalkulado de perforita akvokolekta tubaro por homogena enfluo-distribuo |
| *L. Preradoviĉ* k.a. | Modeligado de hospitalaj funkcioj kaj procedoj (disvolvo de metodologio) |
| *I. Ĥalikova* | La ribelo de Antigona en la samnoma teatraĵo de *Jean Anouilh* |